

Itala Esperanto-Federacio organizas literaturan tradukkonkurson de la itala al Esperanto.

La konkurso konsistas el du branĉoj:

poezio: maksimuma longo ne fiksita

prozo: (rakonto, novelo) maksimuma longo 13.000 tajperoj

La komisiono povos asigni ĝis tri premiojn por ĉiu branĉo.

La rezultoj estos anoncataj enkadre de la itala kongreso de Esperanto, en Heraclea.

Ĉiu persono rajtas konkursi por ĉiu branĉo per maksimume tri verkoj, kies tradukoj devas esti neniam antaŭe eldonitaj per ajna komunikilo (prese, rete, lege, bloge, ktp).

La konkursaĵojn, kune kun la originaloj, oni sendu al la sekretario, Ivan Orsini, prefere per retmesaĝo, al la adreso concorso@esperanto.it indikante la branĉon, la elektitan pseŭdonimon kaj la efektivan nomon kaj adreson. Se tio ne eblas, oni sendu ilin papere al la adreso

Federazione Esperantista Italiana, via Villorresi 38, 20143 Milano, Italia,

indikante sur la koverto "literatura konkurso" kaj enmetante la kontribuaĵo(j)n kaj la originalajn tradukitajn verkojn sen ajna indiko kaj notante en aparta folio ĉiujn necesajn indikojn kiel supre.

Limdato por la sendado estas 30-an de aprilo 2017.

Juĝkomisiono: prezidanto Carlo Minnaja, sekretario: Ivan Orsini, por branĉo prozo: Gabriele Aquilina, Cristina de' Giorgi, Nicola Minnaja; por branĉo poezio: Giulio Cappa, Mauro Nervi, Nicola Ruggiero.

La sekretario informos ĝis la 15-a de aŭgusto la gajnintojn pri la premio.

La partoprenantoj cedas senpage al IEF por la unua jaro la rajton je unua publikigo.

Por **pliaj informoj** : concorso@esperanto.it

FEI, concorso, via Villorresi 38, 20143 Milano, Italia